# KATOLIKA SENTO




5

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV

# KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 50° - 1971**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738 515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

**KATOLIKA SENTO**

N° 5 - Majo 1971

50a Jaro



Kiel omaĝon al la Dipatrino en ĉi tiu maja monato, ni volas traduki la inviton al la Rozario, kiun la Aŭtoro P. Pinckaers titolis:

TIO, KION DIO PENSAS

Preĝu vian rozarion, diras Dio, kaj ne atentu tion, kion sensaĝuloj diras: ke ĝi estas piaĵo transpasinta, destinita al morto.- Mi scias, kio estas pieco: oni ne trompas min; kaj mi asertas al vi, ke ŝatas mi la rozarion, kiam ĝi estas bone eldirita. - La Patroniaj kaj Avemariaj, kaj la misteroj pri mia Filo, kiujn oni devas primediti, mi mem donis al vi. Ĉi tiu preĝo, mi certigas vin, estas kiel evangelradio; neniu devigos min ŝanĝi ĝin. - La rozario plaĉas al mi, diras Dio, ĉar ĝi estas simpla kaj humila, kiel estis mia Filo, kiel estis lia Patrino. - De kiam mi aŭdas la rozarion, ĝi ĉiam plaĉis al mi. Kial do hodiaŭ ĝi ne plu plaĉus al mi? - Do, mia filo, preĝu vian rozarion kiel eble plej bone: ĝi ne malhelpas vin sekvi la sanktan liturgion, kiun mi donis al la eklezio, kiu

estas bela kaj granda kaj ankaŭ majesta, kiu nur kantas miajn laŭdojn. -Preĝu vian rozarion: vi estos kune kun multaj personoj de la evangelio: kun la malriĉa vidvino, kiu ne studadis, kun la publikano, kiu forgesis la katekismon, kun la timplena pekulino, kiun oni volus pereigi, kun la lamuloj, kiujn fido resaniĝis, kun la saĝaj paŝtistoj, kiel tiuj de Betlehemo, kiuj trovis mian Filon kaj lian Patrinon. - Ho, tiu, kiun vi nomas patrino, kiu kuraĝos diri, ke al ŝi ne plu plaĉas la rozario? - Preĝu la rozarion, diras la Sinjoro, kaj ne ĝenu vin la ripetoj, ĉar mi bone konas vin: vi ofte havas la kapon en la aero, kaj pensojn, kiuj turniĝas vane. - Sed se vi volas, ke mi konsentu, ke vi muelu la bonan spiritgrenon, vi devas pacienci eĉ kun vi mem kiel mi same faras. - Necesas, ke via preĝo turniĝu, kaj turniĝu, kiel tra la fingroj viaj rozariobidoj. Tiam, kiam mi volos - vi povas esti certaj - vi ricevos la bonan nutraĵon, kiu revigligas la koron kaj fortikigas la animon. - Preĝu, do, vian rozarion, diras Dio, kaj vivu en paco.

LA DUOBLA NUMERO 2-3 DE EK raportas pri la elekto de la nova estraro. Tralegante ĝin, ni pli kaj pli bedaŭris, konstatante je kiu nivelo ĝi malaltiĝis. Certe, ni ne povis imagi, ke redaktoro kaj membroj de la eksa estraro povis esti tro ĝojaj pri la rezulto de la elektoj. Plendante, ĉar ni ricevis la koncernajn informojn kaj konigis la rezultojn antaŭ la oficiala publikigo de la Generala Sekretario, la eks-prezidanto d-ro Jacques Tuinder (pardonu: frato Jacques Tuinder, kiel ĉiam estas indikite en "Dia Regno" de Aprilo 1971, paĝ. 1490?) diras: "Ĉu ĉi tie decas varma gratulo?" Ni povas respondi, ke en ĉi tiu elekto ne estas loko por sekreteco. Ni rifuzas tion! Kaj li daŭrigas: "Venkis tiuj, kiuj evidente, preferas pure katolikajn aferojn ki-

el diktaturon, cenzuron, neliberecon de opiniesprimado, neeraripovon de la gvidanto, ŝafe blindan sekvadon al la sankta aŭtoritato"... "Mi forte esperas, ke la nova estraro de IKUE-en ekumena rilato- ne resaltos al mezepokaj starpunktoj...". Kaj difinas la novelektitojn ekstreme konservativa kaj ankoraŭ pli griziĝinta estraro". Sed en sia artikolo "Adiaŭ" d.rino Corry vanKleef iras pli antaŭen: "Mi ne nomas ĝin konservativa, sed pli multe romantika (eble eĉ "romromantika"). Ŝi certe ne estas tro ĝentila kun la novaj orientaj aliĝintoj: "Estas ja klare, ke la multaj orienteŭropaj voĉdonintoj ankoraŭ vivas kun romantika ideo pri precipe la por ili malproksima Centro de la katolika Eklezio. La Vatikano estas kiel magia sanktejo, kiun oni ne ektuŝu, sed kies aŭtoritatulojn oni nur obeu senkritike kaj humile". Kaj tamen ŝi tuj aldonas, ke la eksiĝintoj "fakte ne atakis Vatikanon aŭ papon, sed la belan revon de romantika direkto"! ..."Romantikuloj - ŝi asertas- certe verkos artikolojn pri plorantaj madonoj aŭ sangantaj vundoj kiel tiuj de Patro Pio..." Sed kio estas romantiko? Ŝi fine klarigas: "Romantiko estas ja forkuro el la ĉiutaga vivo". Kaj ŝi deklaras: "La realista direkto ne montris tiun bezonon, sed pli intense serĉis al vojoj por socia kaj porpaca agadoj". Je pag. 41 La sama eksvicsekretariino eĉ akuzas nin pri intrigoj pri la estrarelektoj!! Kaj pri nia Katolika Sento "s-ro "Skeptikul" (kaŝnomo de la redaktoro?) klarigas, ke "ĝi estas itala revuo, sed kun internacia splitiga tendenco ". El ĉi tiuj malmultaj citaĵoj, ĉiuj niaj legantoj prijuĝu mem la nivelon de nia Espero Katolika! Kiam, fine, ni legis, preskaŭ ne kredante al niaj okuloj, la disvastigon de la informo, kun gratuloj al la eks-P.Sergio Tovini, kiu forlasis ordenon kaj pastrecon por edziĝi, ni povis ellasi malpreman spiron: se ni estus ricevintaj

unu nuran malgrandan laŭdon el tiaj skribantoj, tio estus por ni doloro kaj honto!

(Kun ĝojo ni povas informi, ke unu el la unuaj streboj de la nova IKUE-prezidanto, estas redoni al Espero Katolika ĝian antaŭan noblecon pri enhavo kaj ankaŭ pri aspekto.)

Ni ricevis el iu nia leganto peton publiki en nia bulteno kelkajn vortojn de p/B.Raschi. Ni volonte faras tion, ĉar ili ŝajnas havi rilaton al la supraj citaĵoj. Nur ni volas akcenti, pri la facilanimaj mokadoj kontraŭ nia pieco, ke ni ne bazas nian amon al la Madono sur asertitaj larmoj aŭ aperoj, sed ĉefe sur la fakto, ke Kristo mem sur la kruco donis ŝin al ni kiel patrinon. Kaj, ke ni kalkulas sanktecon ne el stigmatoj sed el virto. P. Kolbe ne havis stigmatojn, kaj ni admiras lin ne malpli ol P. Pion. Sed jen la vortoj de P. Raschi: "La patrino de la Amo, la Senmakula Virgulino, la Reĝino de la Venkoj donis al ni sian rozarion, per kio neniu problemo fariĝos nesolvebla. Kial forlasi la rozarion? P. Pio de Pietrelcina scipovis preĝi ĝis 35 rozariojn ĉiutage. Same P. Maksimiliano Kolbe, kiu laŭ sia aserto, per la rozario venkis ĉiujn malfacilaĵojn. Li ofte emfazis: Mi spertis, ke per rozario mi sukcesis akiri konvertiĝojn".

CENTRO ESPERANTISTA CATTOLICO ROMANO
N° 93

ALIĜIS AL UECI-CECR kun la bulteno: Romo: A. Del Santo; F. Ruggiero; C. Argentati; Bolonjo: G. Balestrazzi; Como: Esp. Grupo; Ferrara: L. Miccoli; Ĝenovo:

M.E.L.; Mantovo: dL.Bianchi; L. Lodi Rizzini; Mezzolombardo (TN): P.Dao; Mirandola (MO): Esp. Grupo; Mondoví (CN): C.Battaglia; Napolo: Centro E. Campano; Nuoro: G.Mulas; Ozieri (SS): A.Angeletti; Salzano(Venecio): M.Centenaro; Ternengo:(VC): G.Cerutti; Treviso: E.Martina; C.Fornaini; Venecio: L. Stefani; Vercelli: E.Grupo; Verono: G.Fiorini; Vicenza: E.Grupo; Voghera (Pavia): C.Carena; Uliveto Terme: (PI): F.Franchi; Aŭstrujo: A.Daxberger; Finlando: A.Kurikka; Francujo: J.P.Trelluyer; Kongo: W.P. Christiaens; Pollando: R.Nydzinska; Romo: I. Garcia. Entute: 376

PASTROJ, KIUJ INTENCAS ALIĜI, povas celebri unu meson intence de p.Jacobitti, nur avertante lin pri tio. Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron, povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre dirite - sed estas petataj sendi al p.Jacobitti konfirmon, se eble, pri la celebr(i/o)ta meso, subskribita de la pastro; Tiuj, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen ŝatas la bultenon, petu de p.Jacobitti ĝian senpagan sendadon.

BONFARA KASO: 5.000: G.Viti; 2.000: O.Sias, 1.500: A.Signore; Restas: 21.325.

LA PORINSTRUA KOMISIONO de la Itala Deputitara Ĉambro, sub prezidanteco de Hon.Romanato kaj kun ĉeesto de la subsekretario por la P.I.Rosati, ekzamenis la leĝproponon por enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Ĉar aperis kelkaj perpleksecoj pri la aktuala formuligo de kelkaj proponartikoloj, estis elektita malgranda komisiono por alporti al la propono la amendojn, kiujn oni opinias necesaj.

GRAVA FUNEBRO: La 7-an de marto subite mortis en Romo pro infarkto, en la aĝo de preskaŭ 70 jaroj, samideano Ascenzio Blasimme, kiu estris la Esperanto-Fakon de Radio Roma ekde la 22-a de marto 1935-a ĝis la fino de la jaro 1956-a kun escepto de okjara interrompo kaŭzita de la milito kaj de ĝiaj sekvoj. Naskiĝinte la 13-an de majo 1901-a, li esperantiĝis en 1926-a kaj, enirinte kun entuziasmo en la movadon, jam en 1927-a li organizis la 12-an Internacian Kongreson de la Katolikaj Esperantistoj; dum pluraj jaroj estis UEA-fakdelegito pri turismo kaj gvidis Esperantokursojn ĉe la Fervojista Postlaboro kaj aliaj institucioj. Por propagandi la 27-an Universalan Kongreson, kiu havis lokon en Romo en 1935-a, la Ministerio por la Popola Kulturo, kiu helpeme strikte kunlaboris kun la Loka Kongresa Komitato, disponigis al ĝi du dekminutajn elsendojn ĉiusemajne. Ilia aranĝo estis konfidita al Ascenzio Blasimme, kiu kun skrupula zorgo plenumis la taskon, tiel ke li estis konfirmita kiel fakestro ankaŭ kiam la kompetenta instanco decidis plu uzi la internacian lingvon por la turisma propagando. En tiu epoko estis eĉ sendataj al la petintoj la tekstoj de la radio-prelegetoj, la 60-paĝa monata libreto en Esperanto kun la programo de la italaj dissendoj per mallongaj ondoj, kaj luksaj turismaj eldonaĵoj riĉe ilustritaj. Kiam Italujo komencis reflori post la milito, Ascenzio Blasimme denove revenis al sia posteno kun la sama antaŭa entuziasmo, kaj forlasis ĝin nur kiam pro sia pliiĝinta profesia laboro ĉe la fervoja administracio li ne plu havis tempon por flankaj aferoj". (L.Minnaja)

Je la trideka tago de lia forpaso multaj romaj katolikaj esperantistoj partoprenis en la animripoza meso celebrita de P. Jacobitti en S.Maria Maggiore, kun la ĉeesto de la familianoj de la forpasinto. En la kunveno tuj sekvinta s-ano Luigi Minnaja memorigis kun emociaj vortoj la noblan figuron de la malaperinta amiko.

NIAJN KONDOLENCOJN al nia fervora s-anino Prof. Rosa Maudente, kiu perdis sian karan fratinon Vincenza. Ŝian mildan figuron, ĉiam ĉeestanta en esperantistaj kongresoj, ni ne povas forgesi. Dio ricevu en la eternan pacon ŝian elektan animon kaj donu konsolon al ŝiaj karuloj.

RADIO ROMA - ESPERANTO.Majo 1971-a. Dimanĉon la 2-an: Vatikana Radio, ĝia 40-a datreveno; la 9-an: Novaĵoj el Italujo; la 16-an: Kantoj en Esperanto; la 23-an: Leterkesto; la 30-an: Renesanca artisto Donato Bramante. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". La dissendoj okazas de h. 21.00 ĝis 21,20 (M.E.T.). Ondlongoj m. 30,90 - 41,24 - 50,08.

NI RICEVIS LA 1-an cirkuleron por la katolikaj ĉehaj esperantistoj. En ĝi oni informas pri la III-a Tutslovaka Kongreso de Esperantistoj, kiu okazos en Koŝice je la tagoj 4-6 de julio, dum kiu estos eble aprobita la Statuto de la sekcio de la Katolikaj Esperantistoj. Informinte ankaŭ pri Espero Katolika, ankoraŭ ne ricevebla, kaj pri nia Katolika Sento, kiun oni povas mendi rekte de ni, la subskribinto Martin Majtan, prez. de la Slovaka IKUE-Sekcio (Rajecké Teplice 14),memorigas ke laŭ decido farita dum la kunveno en Ceska Trebovà la 13-an de marto, la jarkunveno de la Ĉeĥa Kat.Sekcio, al kiu estas invititaj ankaŭ la Slovakoj,okazos en Pribram. Aliaj informoj koncernas la E-an kurson en Herbortice (organizota de Miloŝ Svacek, Pencice 16, okr.Prerov), kaj la rezultojn de la balotado por la nova IKUE-estraro. Por pliaj informoj, interesuloj skribu al M.Majtan, ne forgesante aldonon de afranko por respondo!

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

El Romo, centro de Katolika mondo, kelkaj informoj pri la vivo kaj agado de l'Eklezio:

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

PRI KOMUNIO PER LA KALIKO la ĝeneralaj dispozicioj listigitaj en la "missale romanum estas 14. Ili tamen povas esti eĉ pli kun permeso de ĉiu dioceza episkopo. Laŭ tiu deklaro de la S. Kongregacio por la dia Kulto, de la 30-a de junio 1970, la belgaj episkopoj difinis la kazojn, en kiuj oni permesas tion, kun nur kelkaj atentigoj pri inda kaj libervola rito. Kompreneble, oni ricevas egale la Sinjoron, ricevante la komunion sub la signo de la pano, aŭ de la vino, aŭ de ambaŭ. Sed la komunio per pano kaj per vino kune signifas pli plene la partoprenon al la korpo kaj al la sango de Kristo: "Pere de la komunio de la korpo kaj de la sango de Kristo, la dia popolo partoprenas en la bonoj de la paska Viktimo, renovigas la novan pakton faritan unufoje por ĉiam al la homoj per la sango de Kristo; anticipas la eskatologian festenon de la ĉiela regno".

LA S.KONGREGACIO POR LA DISCIPLINO de la Sakramentoj diskonigis dekreton pri Konfes-sakramento, la 8-an de decembro 1970 al la kompetentaj religiaj aŭtoritatoj; sed ĝin publikis nur en marto. Ĉi tiu dokumento celas pli larĝan konsciencliberon al gereliĝiuloj, kiuj estas invitataj al ofta konfeso (almenaŭ dufoje pomonate) sed ne devige antaŭ la konfesprenanto ordinara aŭ eksterordinara, aprobita por la religia hejmo. Kiel antaŭe la superuloj devas provizi lin por la komuno, kies membroj tamen povas valide kaj lice konfesi ĉe aiu ajn sacerdoto aprobita en la diocezo.

Ĉi tiun liberecon ekde nun povas ĝui ankaŭ gereliĝiu-
loj dediĉitaj al kontempla vivo, kiuj ne plu estos devi
gataj sin prezenti al konfesprenanto. Intenco de ĉi tiu
deklaro estis forigi de la ĉiusemajna konfeso ĉe gere
liĝiuloj tiun rutinon, kiu malpliigas - ni ne volas diri
nuligas - la esencajn kondiĉojn de la konfeso: pento kaj
konverto; kaj redoni al la animoj la senton de la nean
stataŭebla efiko de ĉi tiu sakramento por pli sankta vi
vo. Do, tute ne malplivalorigi la pentan sakramenton!

Kelkaj, soifantaj novaĵojn, kiuj proponas facilan, sup
raĵan, nur socian kristanismon, emus abolicii, se ne re
dukti ĝin draste. Oni aŭdas, ĉe multaj kristanoj kaj eĉ
sacerdotoj, ke ne plu estas necese konfesi ofte; ke oni
povas komunii sen neniu konfeso, krom ĉe okazo de
gravaj kulpoj, ktp. Fakte, en kelkaj lokoj oni ne plu
konfesas; kaj tio eĉ ne eblas, ĉar mankas konfesejoj
kaj sacerdotoj emaj konfesricevi. Kion oni devas opi -
nii pri tio? Ŝajnas al ni, ke ĉi tio estas la lasta eltro-
vaĵo de la homa malico, eĉ diabla sugesto por forigi de
la homoj konsciencekzamenon kaj la dian admonon, ki-
uj baras vojon al peko, dum samtempe oni klopodas for
preni ĝuste tiun sakramenton, kiu resanigas vundojn
kaj pliigas la gracon. Fakte, iuflanke la konscienco al
kutimiĝas al kulpoj; aliflanke, tiu, kiu sentas ankoraŭ
riproĉon de la konscienco, kiel kuraĝos, celante kon-
feson, sin montri kulpa antaŭ ĉiuj? Fine, ankaŭ la ko-
munio kiu ĉiam invitis al la plej granda pureco de kon
scienco, perdos entute ĉi tiun postulon. Enfosante kon
feson, la malamiko de la eklezio de Kristo, celas bal-
daŭ enfosi la plej grandan trezoron de l'Eklezio, eŭka
ristion kaj komunion. Kio restus post tiaj detruoj? Ĉio
falus.

Ankaŭ la konfessakramento, kiel la aliaj, estos refor

mita. Oni diras, ke ĝi aspektas pli ol antaŭe postrestinta. Parte pro teologia motivo, ĉar oni ĉiam malpli atentas Dion kaj pekon: se Dio kaj peko ne plu maltrankviligas la konsciencojn, pri kio oni konfesu? Parte pro evoluo de la homa konscienco el individua al socia vivo. Kelkaj intertempe senpacience jam enkondukis novajn eksperimentojn, opiniante, ke la pentofara agado, per kiu komenciĝas la meso, anstataŭos la konfeson antaŭ la komunio. Sed oni devas agnoski, ke neniam, en la historio de la eklezio, ĝi havis sakramentan efikon, kvankam la eklezio rajtas tion fari. Multaj do proponis, ke la eklezio forstreku la devon konfesi antaŭ la komunio kaj donu absolvan efikon al la penta agado de la meso. Kiel ajn, restus tamen la devon konfesi la gravajn pekojn post la komunio, en oportuna okazo. Sed kiam kaj kian reformon de la konfeso donos al ni la eklezio, hodiaŭ estas malfacile diri.

ANKAŬ LA KONGREGACIO por la Evangelizado de la Popoloj, sekvante la ekzemplon de la tuta Roma Kurio, fariĝis pli internacia. Jam antaŭe la plej granda parto de ĝiaj konsultistoj kaj ĝia episkopa konsilantaro, kiu direktis ĝin sub kard. Agagianian, estis fakte internacia. Sed la kardinalo estis en Romo jam de kvardek jaroj; krome, sekretario, mons. Pignedoli kaj subsekretario estis italoj. Nun, prefekto de la Kongregacio estas kard. Agnelo Rossi, jam ĉefepiskopo de Sankta Paŭlo en Brazilo kaj prezidanto de la Brazila episkopa konferenco; kaj ek de la sesa de marto aldoniĝis al mons. Pignedoli du novaj sekretarioj: la hinda mons. Simon Lourdusamy, ĉefepisk. de Bangalore, kaj la afrika mons. Bernardin Gantin, ĉefepisk. de Cotonon (Dahomeo). Ili estas du prelatoj ankoraŭ junaj (47 kaj 49 jaroj), kiuj jam havis sukceson en siaj landoj. Mons. Lourdusamy estas ĉefepiskopo de u-

nu el la plej katolikaj urboj en Hindujo, tio estas de la ĉefurbo de Mysore, Bangalore, kie li organizis la unuan "Koncilon de la Hinda Eklezio" en 1969. Li estas prezidanto de la liturgia komisiono de la hinda episkopa konferenco. Mons. Gantin estis unu el la plej aktivaj pri organizado de kunvenoj inter afrikaj episkopoj; kaj okaze de episkopaj konferencoj li pritraktis la temon de la laika apostola agado.

LA SANKTA KONGREGACIO POR Kredodoktrino sendis al la episkopoj kaj reliĝisuperuloj dokumenton pri la normoj sekvendaj rilate la pastran agadon de sacerdotoj laikiĝintaj. Fakte kelkloke, precipe en Nederlando, kie pli multenombraj estas tiuj doloraj kazoj, oni klopodis, ke ili daŭrigu, almenaŭ en kelkaj el la antaŭaj pastraj oficoj. La letero sendita de la papo al kard. Villot, jam respondis al tiuj klopodoj, kiuj celis legitimiĝon: "La eklezio - deklaris la papo - daŭrigos en estonteco, kiel en pasinteco komisii la ministerion de la vorto, la instruon pri la kredodoktrino kaj la disdonon de la sakramentoj nur al tiuj sacerdotoj, kiuj estis fidelaj al siaj devoj... Kun decido farita post serioza meditado, ni deklaras firme nian devon ne akcepti en la pastran oficon tiujn, kiuj, ekpreninte la plugilon, poste turniĝis malantaŭen". La dokumento invitas la episkopojn klopodi spirite kaj ankaŭ materie, ke la eks-sacerdotoj estu helpataj en la kristana vivo. Sed la dokumento ordonas: "Al la sacerdotoj laikiĝintaj estas malpermesite plenumi ian ajn funkciadon de la sankta ordino - escepte la absolvon ĉe mortdanĝero, kiel antaŭvidite en la Kanona Juro. Estas ankaŭ malpermesite al ili celebri liturgiajn servojn, havi homilion, direkti materie aŭ spirite religiajn institutojn, teologiajn fakultatojn, katolikajn lernejojn, k.s."

LA UNUA KONKORDATO inter ŝtato kaj eklezio estis subskribita en Worms, kaj fermis longan luktadon inter

la du plej superaj potencoj. Kelkaj estis porpacaj konkordatoj, kiel tiu de Worms; aliaj por amikeco aŭ pro defendo. Kiam la interkonsento ne estas plena, oni nomas ilin "modus vivendi" (vivmanieroj). Krome ekzistas ankaŭ multaj diversformaj konvencioj. Kelkaj konkordatoj supervivas, kvankam la kondiĉoj, kiuj ilin inspiris, jam funde aliiĝis; sed normale oni venas al novaj revizioj. Inter la plej memorindaj estis la napoleona konkordato (1801); aliaj estas tiu de Haitio (1860), de Kolombio (1887), de Peruo (1874). Ankaŭ diversaj svisaj kantonoj havis diversajn konvenciojn ekde 1828. Post la unua mondmilito estiĝis multaj konkordatoj: kun Baviero (1924), Baden (1932), Prusujo (1929); la lateranaj paktoj (1929); kun la Hitlera reĝimo (1933); kun Aŭstrujo (1933); Portugalujo (1940); Hispanujo (1953); Dominika Respubliko (1954); Malalta Saksonio (1965); "modus vivendi" de Venezuelo kaj de Tunisio (1964); la "Agreement" de la 1964 kun Hungarujo kaj la protokolo de 1966 kun Jugoslavio. Fakte ne ĉiam la ŝtatoj kun komunista reĝimo estas emaj distingi inter Ŝtato de la Vatikana Urbo kaj regado de la universala eklezio. Sed post la vojaĝo de mons. Casaroli al Moskvo, ŝajnas ke oni volas priserĉi oficialajn kontaktojn kun la Vatikana Ŝtato. La fleksebleco de tiaj rilatoj permesis jam al Jugoslavio ĉeeston de "pro-nunco" (anstataŭ-nunco), kvankam ne ekzistas konkordato. En Ĉinio, kie la komunista gubernio elektis kvardekon da episkopoj sendependaj de la papo, depost la "kultura revolucio" oni eĉ ne plu parolas pri la "patruja eklezio". Tamen oni asertas, ke ne estas for de ĉiu ebleco, ke pro politikaj motivoj, precipe internaciaj, la pekina registaro ne lasos al la religiaj konfesioj iom da agadlibero, kondiĉe ke ili rezignu pri ĉia aŭtonomeco kaj ke estu fidelaj al la komunisma kredo. Laste, ankaŭ kun la Libia

registaro la Vatikano enkondukis kontaktojn por nova "modus vivendi", pere de la Apostola Delegito por la Norda Afriko, Mons. Sante Portalupi. Laŭ ĉi tiuj la Sankta Seĝo rezignis pri ĉiuj siaj havaĵoj, kiuj fariĝis propraĵoj de la ŝtato, dum la Libia registaro permesis ke restu du katolikaj eklezioj, unu en Tripoli, la alia en Bengasi kun entute dek sacerdotoj. Sed la episkopo de Bengasi devis forlasi Libion, dum amerika hungarde vena pastro restis por asisto de la fremdaj katolikoj, de pendantaj de la petrolaj societoj.

LA INSTITUCIO DE LA PORMISIA Agado povas prave agnoski la feliĉajn rezultojn de sia agado. En la dio cezo de Bruges (en Belgujo) 2.900 estas la misiistoj, ki uj forlasis sian patrujon por sin dediĉi al la disvastigo de la evangelio kaj de la karitato de Kristo en la plej foraj landoj de la mondo. Okaze de Kristnasko Mons. E. J. De Smedt, episk. de Bruges kun siaj helpantoj volis sendi al ĉiuj misiistoj, filoj de lia diocezo, kuraĝigan kaj gratulan mesaĝon.

LA KONSULTA KONSILANTARO de la Anglikana (pro testanta) Eklezio, kies delegitoj reprezentis 47 milionojn da fideluloj de la anglikanaj eklezioj en Europo, Afriko kaj Azio, aprobis, per 24 voĉdonoj kontraŭ 22, sacerdotigon de virinoj. Tamen, por respekto al la libereco de la opoziciantoj, oni lasis al ĉiu anglikana episkopo decidon por tiu ordino, kun konsento de la fideluloj. Inter la opoziciantoj estas la ĉefepiskopo dr. Ramsey, primato de la Anglikana Eklezio. Ĝis nun nur unu virino estis ordinita, dum la lasta mondmilito en Hongkongo, kiam episkopo Hall, pro manko de sacerdotoj, ordinis diakoninon. Sed post teologia disputo pri la valideco de ĉi tiu ordino, episkopa sinodo, ordonis al la unua virino-sacerdoto de la anglikana eklezio, ne prak-

tiki alian religian servon krom tiun de la diakoneco.Ho diaŭ la unua sacerdoto virina estos denove ordinita en Hongkongo, sed ĉifoje kun konsento de la anglikana Komisiono. Oni povas antaŭvidi novajn diskutojn pri ĉi tiu temo, kaj oni timas, ke ĉi tio dividu pli profunde la anglikanajn ekleziojn inter si, kaj enkonduku dividojn kaj malkonsentojn interne de ĉiu el ili. Fakte, enketo de la Ekumena Konsilantaro de la Eklezioj montris, ke dum 72 eklezioj-membroj tion akceptis, 143 rifuzis. Sed la akceptintaj eklezioj tute ne estas plenkonsentaj. Ekzemple, inter "reformitaj-presbiteranoj" 23 eklezioj ordinas virinojn kaj 33 rifuzas tion. 10 luteranaj eklezioj akceptas tion, 30 estas kontraŭaj: same 8 el 10 de la Metodistaj eklezioj, 5 el 13 de la Baptistaj,ktp. La ortodoksaj eklezioj kaj tiuj de la Malnov.katolikoj restas firme kontraŭaj, konsentante pri tio kun la Roma katolika eklezio. Oni proponas, ke iu vere universala koncilo iam pritraktu la temon.

DU ORTODOKSAJ SAMNOMAJ patriarkoj mortis je distanco de 48 horoj unu de la alia: en Sofio patriarko Kirilo I, kapo de la bulgara ortodoksa eklezio (7-3-71) kaj en Kairo Kirilo VI, kiu oficiale titoliĝas Papo de la Egipta Kopta Eklezio (9-3-71). Ambaŭ havis esceptan personecon, kaj ambaŭ estis elektitaj dum malfacilaj momentoj de siaj eklezioj. Patriarko Kirilo VI devis multe suferi pro la malfavora politiko de la registaro. Sed okaze de la lokigo de la angulŝtono de la ortodoksa katedralo honore al S.Marko ebliĝis nova pli favora interrilato kun la politikaj aŭtoritatoj. La inaŭguro de ĉi tiu katedralo, junie de 1968 donis okazon al alproksimiĝo kun la katolika eklezio. Pere de kard. Duval la papo donacis al la ortodoksa katedralo la relikvojn de S.Marko. Granda freskpentraĵo en la preĝejo memorigas la eventon. La 120 mil katolikaj egip-

taj koptoj kun kard. Sidanaus estas la unuaj, kiuj ĝuis la renovigatan amikecon post 15 jarcentoj de disiĝo. Patriarko Kirilo regadis eklezion kun 6 milionoj de fideluloj. Ankaŭ Kirilo I el Bulgario havis samnombran fidelularon en sia eklezio, unu el la plej malnovaj en Eŭropo, ĉar ĝi naskiĝis en 870. De 1393, depost la turka regado, ĝi ne plu estis patriarka; sed post kiam ĝi estis funde reorganizita en la 1953, Kirilo I reprenis la antikvan titolon. Ankaŭ la bulgara eklezio ne havas glatan vivon. Kvankam la leĝo de la 1949 agnoskis duonoficialan staton al la eklezio, ĝi havas ankoraŭ gravajn malfacilaĵojn: ne estas, ekzemple, permesite doni religian instruon al junuloj malpli ol 18-jaraj, kaj diversaj monakejoj estis fermitaj.

INTENSA ESTIS LA AKTIVECO de la S. Seĝo kun la komunistaj ŝtatoj dum ĉi tiu lasta tempo, kvankam tre prudenta, kaj plejofte nekonata antaŭ la publika opinio. Pri la kvintaga vizito al Moskvo de mons. Casaroli, ni jam parolis en la Aprila numero de KS. Gi fariĝis ebla pro la silentaj duonoficialaj metodaj, konstantaj agadoj de Vatikano pere de la soveta ambasado en Romo, kiuj jam en la 1963 ebligis aŭdiencon de Johano XXIII al Alexei Agiubei, tiam direktoro de "Izvestia", bofilo de Kruŝovo, kaj antaŭ ne longe, de Paŭlo VI al la ministro por eksterlandaj aferoj, Andrei Gromiko. Oni ne povis atendi de la misio de Mons. Casaroli tujajn fruktojn, kaj pro tio kelkaj parolis pri malvarmo de tiuj unuaj kontaktoj. Sed efektive ili estis tre utilaj, ĉar ili reliefigis la konverĝajn punktojn kaj la ĝustan direkton por novaj renkontiĝoj, kiuj certe sekvos. Kaj estas jam pozitiva rezulto, ke ankaŭ la komunista registaro agnoskis, ke estas komuna intereso esplori eblecon de aktiva kunlaboro kun la katolika eklezio. Efektive, akordo kun Vatikano signifus por soveta reĝimo

ponto por atingi la katolikojn de la tuta mondo. Kvankam en la dialogoj kun Moskvo oni startis el la eklezia agado por la paco, tamen, laŭ la konfirmo de mons. Casaroli, ne estis preterlasita la temo, ĉefa por la eklezio, de la religia vivo. Malfacila bazo por komunisma doktrino. Ĉefe en Rusujo, kie la katolikoj estas nur oficiale tri milionoj, sed fakte anigitaj al la ortodoksa rusa eklezio. Tamen io evolviĝas.
Pri Pollando ĉi tiu bazo estas pli solida. Pollando estas nacio, kie la grandega majoritato estas katolika kaj praktikanta, nacio, en kies parlamento sidas dek kvar katolikaj deputitoj, kiu havas la unikan katolikan ĵurnalon. La nova registaro bone konscias, ke neniu efika evoluo de la situacio povas atingi siancelon sen la apogo de la katolika eklezio. Pro tio oni devas bone interrilati kun ĉi tio. Kaj siaflanke, la eklezio, kunlaborante por la progreso, la prospero kaj la paco estas en perfekta armonio kun la evangelio. La 24-an de marto venis al Romo kard. Karol Wotyla, ĉefepisk. de Krakovo, kun mons. Boleslaw Kominek, apostola administranto de Breslavio, kiuj certe raportis pri la renkontiĝo, je la 3-a de marto, de la pola primato, kard. Stefan Wyszynski kun la pola ĉefministro, Jaroszewicz, dum trihora interparolado pri normigo inter eklezio kaj ŝtato. Fakte, dum la sangofluaj strikoj, kiuj faligis Gomulka, la eklezio intervenis, invitante ĉiujn polojn, kredantojn kaj nekredantojn, al repaciĝo. Kaj post ne longe la registaro decidis redoni al la eklezio la bonojn naciigitajn en la nordaj kaj orientaj teritorioj jam apartenintajn al Germanujo. Nun la pola registaro intencas ĉesigi definitive la malvarman militon kun la eklezio, kio dum tiom da jaroj malkvietigis la internan vivon de la lando. Kaj la 1-an de januaro la polaj episkopoj difinis la kondiĉojn, laŭ kiuj de

vos esti bazita tiu repaciĝo: libereco de konscienco, libereco de la religia vivo, libera aliro de ĉiu al la kristana kulturo, rajto al la penslibero kaj al vera informiĝo, ĉesigo de ofendoj kaj persekutoj al la eklezio de la ŝtataj aŭtoritatoj. Ne estas preterlasinde, ke mons. Kominek dum sia vojaĝo al Romo, vizitis kard. Koenig, ĉef. de Vieno, kiu, siavice estis en Romo de la 16 al la 18 de marto, kiel prezidanto de la vatikana sekretariato por la nekredantoj, kiu tiam havis sian unuan plenan asembleon. Tiu vizito ebligis al la kardinalo ricevi instrukciojn pri la proksima vojaĝo al Pollando, kiun li faros laŭ invito de la pola episkopa konferenco. Koenig, oni diras, povos tiuokaze esplori la eblecojn de la tiom prokrastita vizito de la papo al Pollando. Kiel ajn en Czestohowa oni jam pretigis al li indan loĝejon.

Ankaŭ en Bulgarujo la 12-an de marto okazis vizito de la dominikana patro Jerome Hamer, el la sekretariato por la kristana unuiĝo, kun vatikana delegitaro. Unuaj kontaktoj ekde la starigo de la komunista reĝimo.

En Ĉeĥoslovakio estas verŝajne tro frue por konstati tiajn celojn; tamen oni agnoskas pozitiva la fakton, ke la ĉeĥoslovaka registaro sin deklaris disponebla por repreno de la dialogo; kvankam kun bedaŭro oni konstatis, ke oni denove klopodas reorganizi la tiel dirітajn "porpacajn pastrojn", ofte malagnoskitajn de la eklezіaj aŭtoritatoj. Siaflanke la katolika eklezio deziras alveni al la elekto de la sep episkopoj mankantaj de multaj jaroj al la vakantaj diocezoj.

LA DUA ETAPO PREPARE al la "junulara koncilo" altiris ĉe Taizé, je la paska dimanĉo ses mil kvincent gejunulojn el kvardeko da ŝtatoj. Por ebligi al ĉiuj sekvi la ritojn, oni malkonstruis la fasadon de la Repaci

ĝo kaj oni plivastigis la preĝlokon kun granda tendo amfiteatre. Frato Roger, la prioro de la protestanta komuno, difinis la temon de ĉi tiu dua jaro: "La sento de la festo, kiun la reviviĝinta Kristo vigligas en la interno de ĉiu, kreskis; ĝi do ne estas facila akiraĵo. Ĝi implikas luktadon, Ni klopodos, preĝante, por ke la reviviĝinta Kristo helpu nin iri ĝisfunden: li inspiras nin doni nian vivon por ke tiuj, kiuj suferas pro maljusteco, ne plu estu viktimoj de homoj". La protestanta komuno de Taizé ekde la komenco klopodis por la homa tuteca progreso. Kiam tiu komuno havis dekdu fratojn, kelkaj decidis labori ĉe minerala baseno por kunvivi la laboristan kondiĉon. Aliaj estis senditaj malproksimen inter malriĉuloj en malgrandaj komunoj. La protestanta komuno de Taizé tre simpatias al la katolikoj. En Taizé ili kunvivas kun kelkaj katolikaj religiuloj. Aliaj estas en Recife, en la diocezo de Mons. Camara, kune kun brazilaj benediktanoj. En Afriko, ĉe la ĉefurbo de Ruando ili laboras same kun afrikaj benediktanoj. Aliaj en la regiono de Niĝerio kun Redentoranoj; kaj en Usono, ĉe geto de Ĉikago, kun kelkaj franciskanoj. Kie ajn troviĝas, la fratoj kuniĝas tri foje tage kaj unufoje nokte por la komuna preĝado.

KARD. GOUVON ĉefep. de Rennes, malfermante je la 27-a de februaro la kongreson de la movado "Pax Christi", kies prezidanto li estas, parolis, laŭ la temo de la kongreso, pri la respondeco de ĉiu kristano pri malarmigo. Fakte Francujo, forlasinte la Ĝenevan malarmigan konferencon, kaj donante masivajn armilajn helpojn al kelkaj ŝtatoj, prenis sur sin gravajn respondecojn. El la diskutoj reliefiĝis la malfacilaĵoj de malarmigo; kaj oni proponis, ke ŝtata entrepreno pristu

du kaj organizu la klopodojn farendajn por atingi la celon de progresema internacia malarmigo.

MONS. LE BOURGOIS, episk. de Autun (Francujo) decidis, ke al ĉiu mortinto oni povas doni religian enterigon, sen rigardo al la antaŭa neleĝa sinteno kaj eĉ post deklaro de kanona kondamno, se nur li kelkmaniere esprimis antaŭ la morto tiun deziron. Tiel la episkopo intencis interpreti la 1-an paragrafon de la kanono 1240, kiu ekskluzivas "famkonatajn apostatojn", malvastigante la escepton nur al tiuj, kiuj postlasis neniun signon de reveno al la eklezia disĉiplino. Kvankam tiu dispozicio validas nur en la diocezo de Autun, tamen oni povas konjekti, ke ĝi estos baldaŭ sekvata ankaŭ de aliaj diocezoj.

LA KOMUNA KOMITATO de la Reformita Alianco kaj de la Tutmonda Lutera Federacio, reprenis ekzameni la proponon de vere universala koncilo. Tiu propono aperis jam en la asembleo de Upsala antaŭ tri jaroj, iniciate de la Ekumena Konsilantaro de la Eklezioj. La lutera episkopo de Kiel, mons. Huebner, klarigis, ke la fondintoj mem de la Reformo, esprimis deziron alveni al universala koncilo.

LA REGISTARO DE LA Demokrata Germana Respubliko decidis, ke de la 1-a de marto ĉiuj religiaj manifestacioj devas esti anoncitaj al la policistaro kaj devas ricevi koncernan permeson. Tiu devo malhelpas precipe la sinodojn kaj la kunsidojn de ekleziaj komitatoj, por kiuj estos permesitaj nur personoj aktivaj en la servo de la eklezio, sed ne tiuj, kiuj havas sian kutiman laboron ekster ĝi.

EN HUNGARUJO troviĝas nun preskaŭ 4.000 sacerdotoj. Tion asertas agentejo "Kathpress", precizante ke kompare al la 1950-a oni konstatas malpliigon de 900

unuoj. La sama informorgano deklaras, ke la hungaraj katolikoj estas preskaŭ ses milionoj kaj duono,tio estas la du trionoj de la loĝantaro. La nombro de la parokoj kaj de la centroj de la parokaj helpantoj estas 1093.

LA OFICIALA VIZITO DE marŝalo Tito al la Papo,lunde la 29-an de marto, la unua de iu socialista ŝtatestro en Vatikano, havis grandan resonancon en la publika opinio. La aŭdienco daŭris pli ol unu horo; malmultaj informoj pri ĝi estis donitaj de la Vatikana fonto. Nur oni asertis, ke ĝi estis tre fruktodona,ambaŭflanke. Ĉe la fino estis prezentitaj al la papo la edzino de la prezidanto kaj la sekvantaro. En sia saluto Tito parolis pri la jugoslavaj interesoj por la tutmonda paco, kun precizaj rimarkoj pri la mezorienta konflikto. La papo, laŭ la spirito de la neŭtraleco de la Sankta Seĝo, ne tuŝis apartajn temojn, sed akcentis la precizan celon kaj la seninterrompon klopodon de la S.Seĝo por la paco. La papo montris, parolante al li, intencon sentigi sian voĉon al aliaj socialistaj ŝtatoj, kiuj ne fidas pri la eklezio kaj ne sukcesas trovi akordon aŭ almenaŭ kompromison kun la eklezio: "La plena konscio pri sia spirita misio kaj pri ĝiaj limoj, kion la katolika eklezio solene ankaŭ dum ĉi tiu nia tempo reasertis, certigas kontraŭ ĉiu timo pro ne eblaj invadoj aŭ intermiksoj en la sferon de la ŝtata legitima kompetenteco". Memorante la intimajn kontaktojn inter la apostola Seĝo kaj la jugoslavaj katolikoj, la papo parolis pri misio de la jugoslava popolo, kiu devas alceli renkontiĝon kaj interkomprenon por la paco de la popoloj. Kaj Jugoslavio - diris la papo - celas tion, sub la impulso kaj gvidado de via moŝto, disvastigante sian internacian influon trans la

eŭropajn limojn". Prezidanto Tito donacis al la papo bronzan "Pietà", skulptaĵon de la jugoslava artisto Rosandic. Jugoslavio estas la dua komunista ŝtato, post Kubo, kiu havas regularajn diplomatajn interrilatojn kun la S.Seĝo ekde 1966.

TIUJ, KIUJ ANKORAŬ PAROLAS pri "Silenta ekle-zio" en Pollando, oni legas en Le Figaro, la 5-an de aprilo, estas 15-jaraj postrestintoj. Unue ĉar kard. Wyszynski ne estas homo, kiun oni povas facile buŝoŝlosi; poste, ĉar Pollando estas vere la unua filo de la eklezio pro la nombro kaj pro la kredsincereco de siaj fideluloj. La katolika eklezio havas 6.346 parokojn, 13.276 preĝejojn kaj kapelojn, kun 17.836 ekleziuloj. En la 3.000 monakinejoj vivas kaj preĝas 30 mil monakinoj kaj religiulinoj (indikoj de la 1968-a).La klerikaj organizacioj konsistas en 48 seminarioj. Katekismo estas instruata en 18.000 centroj. Oni opinias, ke 95-98 % de la ĵusnaskitoj estas baptitaj, La ritoj estas frekventitaj de la 60-70 % de la loĝantaro (100 % en la kamparo, 30-40 en la urboj). Sed la junuloj estas malpli fervoraj kaj la procentoj malpliiĝos iom post iom. Trideko da preĝejoj estas provizitaj per la Defenda Ministerio; kaj kapelanoj zorgas la spiritan asiston en malliberejoj. En Varsovio kaj en aliaj grandaj urboj 10 religiaj institucioj instruas junulinojn, kiuj je la fino de siaj studoj akiros stabilajn diplomojn. En la ĉefurbo, religiulino de N.Sinjorino de Nazareth instruas la doktrinon de Lenino kaj de Markso. La praktiko de la religio apartenas al la laborklaso same kiel al la altaj socitavoloj. Antaŭ dudek jaroj la Ŝtato konstruis ĉe Krakovo, la malnova ĉefurbo, konsiderinda ferindustrian komplekson kun nova urbo projektita por 100.000 loĝantoj. Nowa Huta celis esti tri-

umfo de la socialisma ideo. Ĉion oni antaŭvidis: teatrojn, magazenojn, stadionojn. Nur mankis preĝejo. Oni diris: Krakovo havas 60 preĝejojn, kaj estas je nur kvaronhora distanco de la nova urbo. Sed la loĝantoj ne akceptis la argumentadon. Delegacio da 10.000 personoj iris al Krakovo, postulis preĝejon kaj starigis okaze de tiu pilgrimado lignan krucon, 10 metrojn altan, kiu estis enplantita en la granda placo: "Tie estos nia preĝloko". Nun la preĝejo estas preskaŭ finkonstruita. Ĝin atendante, ĉiuj partoprenis en la ritoj subĉiele, eĉ dum neĝado. Ne facile la reĝimo akceptis pilgrimadojn al Czestochowa, kiu havas 50.000 fidelulojn. Kaj estas konata la firma rezisto de la kardinala primato en multaj okazoj. La katolika eklezio konscias pri sia forto. Ekzistas ankoraŭ diversaj postuloj de la pola eklezio, sed de kelkaj jaroj oni ne plu havis ne supereblajn konfliktojn.

EPISKOPARA LETERO, en kiu la polaj episkopoj energie malaprobas la leĝan aborton, estis legita en ĉiuj preĝejoj en marto. La episkopoj asertas, ke okazas en Pollando preskaŭ 750 abortoj ĉiutage kaj verŝajne nun eĉ duoble. Ekde la 1959-a la leĝo rajtigis unu milionon da abortoj. En la proksimaj ŝtatoj, en R. D.T., en Ĉeĥoslovakio, en Bulgario kaj ankaŭ en Sovetunio, la aŭtoritatoj, konstatinte la danĝerojn de la situacio, klopodas ripari. Ĝis la 1950-a la naskiĝkvanto en Pollando estis unu el la plej alta en Eŭropo, kun pli ol 20 por mil; sed en la 1969-a ĝi falis al 8,2. En kelkaj grandaj industriaj centroj, kiel Lodz, ĝi malaltiĝis en 1970-a al 0,4 por mil. "Estas necese, ke ni prenu la nepre necesajn rimedojn" - fine deklaras la letero.

326-PAĜA VOLUMO: IV Dialogo inter luteranoj kaj

katolikoj" resumas la diskutojn en Usono celantajn agnoski reciproke la validecon de la sakramentoj. En komuna konkludo, la teologoj rekonas, ke la religia ministerio devenas "de la apostoloj kaj estis donita de Dio", kaj ke ĝi estas komisiita kun la ordino por la tuta vivo, kaj ke ĝi ne devas esti ripetita. Oni tamen ĉiam memoru, ke opinioj de teologoj ne estas same ol doktrino de la eklezio; kaj pro tio ili devas esti akceptitaj kun prudenta rezervo.

KVIN ORTODOKSAJ EPISKOPOJ akuzas patriarkon Atenagoro, ĉefepiskopo de Konstantinopolo, ke li klopodas treni la ortodoksan eklezion renkonte al katolikismo. Temas pri mons. Agostinos de Florina, Jakovos de Mithimni, Polikarpos de Siatista, Amvrossios de Eleftheroupolis kaj Pavlos de Paramythia. Patriarko Atenagoro estas favora al unuigo de la eklezioj, kaj li de longe laboras tiucele. La kvin malkonsentaj episkopoj rifuzis mencii dum solenaj liturgiaj oficoj la nomon de la patriarko, kiel devige. Kaj ĉar tiu mencio esprimas la unuecon de la vivanta korpo de Kristo, tio estas la eklezio, ili riskas esti demisiitaj de sia episkopa katedro, kiel skismaj.

BOLIVIO, KIEL ĈIUJ ALIAJ sudamerikaj ŝtatoj, rapide industrie ekflugas. Spite de la klopodoj de la registaro estas tro malsufiĉa la kvalifikita manlaboristaro. La salesanoj memvole proponis al la registaro siajn laborejojn kaj profesiajn lernejojn por kvalifiki la junajn laboristojn, kiuj aspiras fariĝi teknikistoj. La iniciato startis de la kolegio Don Bosco en La Paz, en la nomo de la tuta Salesa institucio en Bolivio. Rezulto de la unuaj interparoladoj: prezidento Alfredo Ovando Candia rajtigis la porinstruan ministerion subskribi kontrakton por "enkonduki en la Kolegion Don Bosco kursojn intensajn kaj rapidajn por trejni senpage manlaboristaron. La di

plomoj, kiujn la Salesa kongregacio disdonos fine de la kursoj, havos leĝan valoron. La kontrakto disponas, interalie, ke la laboritaĵoj efektivigitaj de la lernantoj, estos ilia akiritaĵo.

LA KREDO DE PELE. La plej fama stelo de l' monda futbalo sendube estas la brazilano Pele. Laste en Meksiko li rimarkinde kontribuis al tio, ke Brazilo denove akiris la titolon de l' monda majstro. Tamen Pele estas ne nur grandioza majstro de futbalo, li estas ankaŭ kredanta kristano. En intervjuo li esprimiĝis pri ĉi tio jene: "Kredi en Dio signifas esti homo. Persone mi estas kredanta katoliko. Mia tuta familio estas kredanta. Delonge estis mia deziro, per mia vivkonduto atesti pri Dio. Mia piłkludo estas ankaŭ la esprimo de mia kredo en Dio. Kiel la tuta naturo laŭdas Dion siamaniere, tiel ankaŭ ni sportistoj laŭdas Dion niamaniere." Ĉe alia okazo diris Pele: "Se mi akcentas, ke mi estas katoliko, tiam mi deziras per tio esprimi, ke mi estas katoliko aplikanta. Ĉar miaopinie estus absurdo konfesi sian apartenon al la komuneco de l' kredantoj, kaj per sia vivkonduto atesti tute kontraŭe pri io alia. Preskaŭ ĉiuj miaj kolegoj estas kredantaj, kiel multaj mondfamaj asoj de l' sporto estas laŭkonvinke kredantaj kristanoj. (F. Walas - Pollando)

..................................................

Batalo por pli bona mondo estas batalo por amo.

M. Quoist

Ĝentlemano estas tiu, kiu neniam volas al iu malbonfari.

Kardinalo Newman

(El "Maksimino Universala" de B. Grim)

..................................................

ABONO: £. 1.000 (us. dol. 1,60). Poŝtĝirkonto 3-7791 al: D.ro C.C. Ferrari; aŭ pĝk 1-37638 al: P. Giacinto Jacobitti.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo